Fervoja Esperantisto

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

STIFTUNG BSW

Numero 1 Januaro - Marto 2017

Kuriositäten auf der Autobahn Kuriozaĵoj sur la aŭtoŝoseo



Kamiono kun elektra trakcio sub kontaktlineo
(vd. paĝo 5, foto Siemens Pressebild)

LKW mit Elektrotraktion unter Fahrleitung
(s. Seite 5, Foto Siemens Pressebild)

Karaj gelegantoj	2	Liebe Leserinnen und Leser	2
Veni kaj iri	3	Kommen und Gehen	3
Kuriozaĵoj sur la aŭtoŝoseo	5	Kuriositäten auf der Autobahn	5
Respekto por la sekundo	6	Respekt für die Sekunde	6
Centra kotiza konto de GEFA	7	Zentrales Beitragskonto der GEFA	7
Lanbula ĉapelo kaj ŝinko	8	Bollenhut und Schinken	8
Rolf Terjung mortinta	11	Rolf Terjung verstorben	11
Sendorme	12	Schlaflos	12
GEFA-anoncoj, redakcio	12	GEFA-Mitteilungen, Redaktion	12



Karaj gelegantoj,

sub la nomo de Rolf Terjung sur la poŝtkesto jam estis gluita la nomo de la sekvantaj loĝantoj. La loĝejo mem atestis la staton de la renovigaj laboroj: kestoj, dismuntitaj mebloj, tukoj, farbositeloj kaj malvarma mucideco.

Ni estis interkonsentintaj viziton aŭtomobilan kun sufiĉe da transportkapacito. La saluto estis amika kaj la tempo sufiĉis por iom da babilado kaj taso da kafo. Ne necesis kune trarigardi la ŝrankojn. La kolektitaj esperantaĵoj jam atendis en la kelo.

Ree hejme mi volis nepre ne ripeti la eraron forŝovi la kartonkestojn el la fokuso. Mi decidis ignori la konsilon el la "Manlibro pri arkivado" kaj komencis per la libroj. Listigi ilin en komputila tabelo prave promesis rapidan sukceson.

Sekvis kesto kun objektoj, kongresaj memoraĵoj, posedaĵoj de la grupo Duisburg (kun amo nodita murtapiŝo kun urba blazono). Kio estis konservenda, migris en la korbon "muzeo?".

Troviĝis kelkaj fotoj - ankaŭ diapozitivoj. Primare ili montris nekonatajn personojn, konstruaĵojn kaj pejzaĝojn. Evidente ili estiĝis dum kongresekskursoj: sen intereso por arkivoj, diras la "Manlibro".

Lasta kaj plej granda kolekto estis aktoj. En ili nomlistoj, kasraportoj jardekojn aĝaj, organiza korespondaĵo pri aranĝoj, asociaj protokoloj, antaŭmilitaj bultenoj – dokumentoj, kies valoro nur evidentiĝas tralegante ili, kaj kiuj montras ke ankaŭ bonvola manlibro ne evitas slipdroni inter la paperoj.

La ĵus el la mano metita bulteno de la Esperanto-Asocio de Germanaj Fervojistoj de la 21-a de Aprilo 1934 finiĝis per la atentigo:

La Esperanto-stelo ne povas esti portata sur la uniformo, ĉar lastatempe kun uniformo dum aŭ ekster deĵoro insignoj ankaŭ de patriecaj

Liebe Leserinnen und Leser,

unter dem Namen von Rolf Terjung auf dem Briefkasten war schon der Name der nachfolgenden Bewohner geklebt. Die Wohnung selbst zeugte vom Stand der Renovierungsarbeiten: Kisten, zerlegte Möbel, Tücher, Farbeimer und kalte Feuchtigkeit.

Wir hatten einen Besuch vereinbart mit Auto und genügend Transportkapazität. Die Begrüßung war freundschaftlich und die Zeit reichte für etwas Plaudern und eine Tasse Kaffee. Es war nicht notwendig gemeinsam die Schränke durchzusehen. Die gesammelten Esperanto-Sachen warteten schon im Keller.

Zurück zu Hause wollte ich auf keinen Fall den Fehler wiederholen, die Kartons aus dem Blickfeld zu schieben, stapelte alles im Wohnzimmer, beschloss den Ratschlag aus dem „Handbuch zur Archivierung" zu ignorieren und fing mit den Büchern an. Sie in einer Computer-Tabelle aufzulisten versprach berechtigterweise einen schnellen Erfolg.

Es folgte eine Kiste mit Gegenständen, Kongress-Souvernirs, Eigentümern der Gruppe Duisburg (ein liebevoll geknüpfter Wandteppich mit Stadtwappen). Was aufzuheben war, wanderte in den Korb „Museum?"

Es fanden sich einige Fotos – auch Dias. In erster Linie zeigten sie unbekannte Personen, Gebäude und Landschaften. Offenbar entstanden sie auf Kongress-Ausflügen: Uninteressant für Archive, sagt das „Handbuch".

Die letzte und größte Sammlung waren die Akten. Darin Namenslisten, Kassenberichte Jahrzehnte alt, organisatorischer Schriftverkehr zu Veranstaltungen, Verbandsprotokolle, Vorkriegsrundschreiben – Dokumente, deren Wert sich erst beim Durchlesen zeigt und die zeigen, dass auch ein gutwilliges Handbuch nicht verhindert, sich zwischen den Papieren zu verzetteln.

Das gerade aus der Hand gelegte Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes Deutscher Eisenbahner vom 21. April 1934 schloss mit dem Hinweis:

Der Esperantostern kann auf der Uniform

asocioj ne rajtas esti portataj. Por militaj honorigoj tiu restrikto ne validas. Dezirate estas, ke la kamaradoj ankaŭ plue sur la civilaj vestaĵoj ekster deĵoro portu la Esperanto-stelon.
(sube manskribite "lasta sciigo antaŭ dissolvo")



Salutas vin

Guido Brandenburg

nicht getragen werden, da neuerdings zur Uniform in und außer Dienst Abzeichen auch vaterländischer Verbände nicht getragen werden dürfen. Für Kriegsauszeichnungen gilt diese Einschränkung nicht. Erwünscht ist, dass die Kameraden auch weiterhin auf der Zivilkleidung außer Dienst den Esperantostern tragen. (darunter handschriftlich „letzte Mitteilung vor der Auflösung")

Es grüßt euch

Guido Brandenburg

Veni kaj iri



Danko kaj adiaŭo por Achim Meinel fare de Margarete Zavoral, Prezidantino de la afergvida BSW-estraro

Dank und Abschied für Achim Meinel durch Margarete Zavoral, Vorsitzende des geschäftsführenden BSW-Vorstands

La 1-an de Januaro 2007 Achim Meinel transprenis de Rolf Terjung oficon kaj respondecon de la BSW-ĉefkomisiito por Esperanto kaj samtempe prezidanto de GEFA. Dek jarojn pli poste, la 1-an de Januaro 2017 li transdonis la taskojn al Bodo Ehrlich kaj retiriĝis el la estraro. Okazo por konciza restrospektivo:

Kadre de la Kultura Ligo de GDR organizis sin 1965 la Centra Laborrondo Esperanto. Por reprezenti la specifajn interesojn de la fervojistoj en la jaro 1977 fondiĝis la Fakgrupo Fervojistoj-Esperantistoj (FFE) en Berlin. Ties unua prezidanto estis Achim Meinel. Lia nomo estas ligita al la evoluo de FFE, vojaĝoj, kreo kaj flegado de kontaktoj en eksterlandon kaj nelaste la aliĝo de FFE kiel landa ascocio al IFEF. Unuiĝo de la du germanaj ŝtatoj kaj planita kunfando de la du germanaj fervojoj sekvigis konstruon de paralelaj strukturoj en la socialorganizoj de DB kaj DR. En la jaro 1993 el

Kommen und Gehen

Am 1. Januar 2007 übernahm Achim Meinel von Rolf Terjung Amt und Verantwortung des BSW-Hauptbeauftragten für Esperanto und gleichzeitig die Präsidentschaft der GEFA. Zehn Jahre danach, am 1. Januar 2017 hat er die Aufgaben an Bodo Ehrlich übergeben und sich aus dem Vorstand zurückgezogen. Gelegenheit für eine kurze Rückschau:

Im Rahmen der Kulturbunds der DDR organisierte sich 1965 der Zentrale Arbeitskreis Esperanto. Um die spezifischen Interessen der Eisenbahner zu vertreten, wurde 1977 die Fachgruppe Eisenbahner-Esperantisten (FFE) in Berlin gegründet. Ihr erster Präsident war Achim Meinel. Sein Name ist verbunden mit der Entwicklung der FFE, mit Reisen, mit Schaffen und Pflegen von Kontakten im Ausland und nicht zuletzt mit de Beitritt der FFE als Landesverband zur IFEF.

Vereinigung der zwei deutschen Staaten und geplante Verschmelzung der zwei deutschen Eisenbahnen hatte den Aufbau paralleler Strukturen in den Sozialenrichtungen der DB und der DR zur Folge. Im Jahr 1993 wurde aus den einzelnen FFE und GEFA die gemeinsame GEFA, in der Achim bis zu seinem Vorsitz verschiedene Rollen spielte, unter anderem als Vertreter der GEFA im Komitee der IFEF. Ein herausragendes Ereignis während seiner 2007 begonnen Präsidentschaft war der 64. Internationale Eisenbahner-Kongress in Herzberg.

Einen Einfluss hatten Teilung und Vereinigung

apartaj FFE kaj GEFA fariĝis komuna GEFA, en kiu Achim ĝis la prezidantiĝo ludis diversajn rolojn, inter alie kiel reprezentanto de GEFA en la komitato de IFEF. Elstara okazaĵo dum lia 2007 komencinta prezidanteco estis la 64-a Internacia Fervojista Kongreso en Herzberg

Influon havis divido kaj unuiĝo ankaŭ al la esperantista historio de Bodo Ehrlich, kiu 1989 legis pri la lingvo kaj pri Cseh-kurso en Halle (Saale). En la sekvintaj du jaroj li sekvis sian kreskantan intereson, 1992 en Münster ĉeestis sian unua Internacian Fervojistan Kongreson de IFEF kaj 1993 membriĝis en GEFA.

Sep jarojn poste Joachim Gießner petis lin kiel sekretarion en la GEFA-laborkomisionon. Ek de tiam Bodo kontinue kunagis en diversaj funkcioj. Bodo Ehrlich estas aktiva fervojisto laboranta kiel maŝinkonstrua inĝeniero en la evoluigo de surrelaj veturiloj. Lia ĉefa sidejo estas Kassel, sed sekvante siajn projektojn li ciganas tra tuta Federacio kaj partoprenas en la vivo de la Esperanto-grupoj kie ajn tio estas ebla.

Ni dankas al Achim Meinel pro la energio kaj la ideoj investitaj en la pasinteco.

La transiro de la prezidanteco samtempe signifas generacian ŝanĝon. Konsiderante la atendeblajn reformojn en la fondaĵo BSW ni ĝojas, ke ĉe la pinto de GEFA staras nun fervojista kolego profesie ankoraŭ aktiva kaj ligita kun la entrepreno. En tempo, kie kontinua nur estas la ŝanĝo, liaj informoj kaj kontaktoj helpos retrovi la aliron al la pli junaj kolegoj – eble.

Li ebligos uzi la komunikajn rimedojn kaj konservi la renomon de GEFA kiel aktiva kultura grupo – tion ne eble, sed certe!



Guido Brandenburg

auch in der Esperantisten-Geschichte von Bodo Ehrlich, der 1998 etwas von der Sprache und von einem Cseh-Kurs in Halle (Saale) las. In den darauf folgenden zwei Jahren folgte er seinem wachsenden Interesse, war 1992 in Münster auf seinem ersten Internationalen Eisenbahner-Kongress der IFEF und trat 1993 der GEFA bei.



Bodo Ehrlich,
nova prezidanto de GEFA

Bodo Ehrlich,
neuer Vorsitzender der GEFA

Sieben Jahre später bat ihn Joachim Gießner als Sekretär in den GEFA-Arbeitsausschuss. Von da an machte Bodo kontinuierlich in verschiedenen Funktionen mit. Bodo Ehrlich ist ein aktiver Eisenbahner, der als Maschinenbau-Ingenieur in der Entwicklung von Schienenfahrzeugen arbeitet. Sein Hauptsitz ist Kassel, seinen Projekten folgend, zigeunert er aber durch die ganze Bundesrepublik und nimmt wo immer das möglich ist am Leben der Esperanto-Gruppen teil.

Wir danken Achim Meinel für die Energie und die Ideen, die er in der Vergangenheit eingebracht hat.

Der Übergang der Präsidentschaft bedeutet gleichzeitig einen Generationswechsel. Mit Blick auf die zu erwartenden Reformen in der Stiftung BSW freuen wir uns, dass an der Spitze der GEFA nun eine Eisenbahner-Kollege steht, der noch im Beruf aktiv und mit dem Unternehmen verbunden ist. In einer Zeit, in der nur die Veränderung von Dauer ist, werden seine Informationen und Kontakte uns helfen, den Zugang zu den jüngeren Kollegen wiederzufinden – vielleicht.

Er wird uns ermöglichen, die Kommunikationsmittel zu nutzen und den Ruf der GEFA als aktive Kulturgruppe zu erhalten – das nicht vielleicht, sondern sicher!

(trad. Brandenburg)

Kuriozaĵoj sur la aŭtoŝoseo

Sur du germanaj aŭtoŝoseaj sekcioj de A1 apud Lübeck kaj de A5 inter Darmstadt kaj Frankfurt fine de la jaro 2018 en la aŭtomobilkolonoj kunveturos troleaj kamionoj. La federacia ministerio pri trafiko elektis tiujn sekciojn por testi kamionojn kun elektra trakcio sub „realaj liverkondiĉoj“ kaj pretas subvencii tiun eksperimenton per 35 milionoj da Eŭroj.



30% da elektraj kamionoj ŝparas 6 milionoj da tunoj karbdioksido
30% Elektro-LKW sparen 6 Mio t CO_2
(Desegnaĵo/Zeichnung: Siemens Pressebild)

Fervojisto demandas sin unue, al kiu kaj por kio tio utilas.
Fervojisto pensas pri la kostoj por instalo kaj vartado de la kontaktlineo kaj rememoras la neresponditajn postulojn pri ekvilibro de la traceaj kostoj de strato kaj fervojo, pensas pri la avantaĝo de spacoŝparaj trakoj kiel parto de la porfervoja energikonduka sistemo en Germanio 20.000 kilometrojn longa.
Kaj fervojisto cerbumas ĉu efektive necesas sendi tiajn kuriozaĵojn sur la stratojn dum la kapacito de la kombinita fervoja vartrafiko ne estas elĉerpita aŭ restas vastigebla.



Guido Brandenburg

Kuriositäten auf der Autobahn

Auf zwei deutschen Autobahnabschnitten der A1 bei Lübeck und der A5 zwischen Darmstadt und Frankfurt werden zum Ende des Jahres 2018 Oberleitungslastkraftwagen in den Autoschlangen mitfahren. Das Bundesverkehrsministerium hat diese Abschnitte ausgewählt, um Lkw mit elektrischer Traktion unter „realen Lieferbedingungen“ zu erproben und ist bereit, dieses Experiment mit 35 Millionen Euro zu bezuschussen.
Ein Eisenbahner fragt sich zuerst, wem oder was das nützt.
Ein Eisenbahner denkt an die Kosten für die Erstellung und Instandhaltung der Fahrleitung und erinnert sich an die unbeantworteten Forderungen nach einem Gleichgewicht der Fahrwegkosten von Straße und Eisenbahn, denkt an den Vorteil der raumsparenden Gleise als Teil eines Energieführungssystems für die Eisenbahn, das in Deutschland 20.000 Kilometer lang ist.



Kamiono sur reloj – ankaŭ subvenciebla?
Ein LKW auf Schienen - auch förderfähig?
(Foto: nekonata, unbekannt, WikiMedia)

Und ein Eisenbahner grübelt darüber, ob es wirklich notwendig ist, solche Kuriositäten auf die Straßen zu schicken, so lange die Leistungsfähigkeit des kombinierten Ladungsverkehrs nicht erschöpft ist oder ausbaufähig bleibt.

(trad. Brandenburg)

Respekto por la sekundo

Trajno ekveturanta 5 minutojn kaj 59 sekundojn post la plano laŭ difino estas akurata[1]. Kial do respekti la sekundon?

Kompreneble, ĉar sekundoj sumiĝas al horoj kaj ĉar fervoja trafiko en densa reto dependas de funkciantaj konektoj. Malfrua trajno sekve influas aliajn kaj tial ankaŭ estas koncernataj pasaĝeroj sidantaj en aliaj trajnoj. La decido akceli per teknikaj artifikoj la procedojn antaŭ ekveturo tial certe havas sencon.

Trajnpersonaro preta por laŭhorara ekveturo el stacio sekvas rutinon, kiu preskribas inter alie la kontrolon, ĉu la pasaĝeroj estas el- kaj enirintaj la trajnon kaj la pordoj estas fermitaj.

Lasta kondiĉo estas la konsento de la trajntrafikestro, ĉar tiu elektas la itineron kaj garantias sekuran traveturon. Signalo por tiu konsento regule estas la verda lumo (respektive la levita alo) de la elira signalilo.

Tiu sama verda lumo kvitancas la pretan kaj liberan vojon, la fiksitan itineron. Ĉar tiu nun blokas ĉiujn aliajn, kiuj tuŝas aŭ krucas ĝian vojon kaj tio en grandaj stacioj povas esence malfaciligi la fluon de la trafiko, la koncerna trajntrafikestro kutime atendas ĝis la lasta momento.



Supre la veturanonca signalilo, sub ĝi la jam konata veturinforma/ Oben das Signal zur Fahrtankündigung, darunter das zur Fahrtinformation (Fahrtanzeiger)

Projekto en la kadro de programo „PlanStart“ de la Germana Fervojo nun sekvas la ideon anonci al la trajnpersonaro, ke baldaŭ sekvos la verda lumo kaj instigi komencon de la ekveturaj preparoj. Tiu anonco okazu per nova lumsig-

Respekt für die Sekunde

Ein Zug, der 5 Minuten und 59 Sekunden nach Plan abfährt, ist per Definition pünktlich[1]. Warum also die Sekunde respektieren?

Natürlich, weil Sekunden sich zu Stunden summieren und der Eisenbahnverkehr in einem dichten Netz von funktionierenden Anschlüssen abhängt. Ein verspäteter Zug hat Auswirkungen auf andere und damit sind auch Reisende betroffen, die in anderen Zügen sitzen.

Die Entscheidung, mit technischen Tricks die Prozeduren vor der Abfahrt zu beschleunigen, hat daher sicherlich einen Sinn.

Das Zugpersonal, das bereit ist für die fahrplanmäßige Abfahrt aus einem Bahnhof, folgt einer Routine, die unter anderem die Prüfung vorschreibt, ob alle Reisenden den Zug verlassen und bestiegen haben und die Türen geschlossen sind. Die letzte Bedingung ist die Zustimmung des Fahrdienstleiters, weil dieser die Fahrstraße auswählt und die sichere Durchfahrt gewährleistet. Das Signal für diese Zustimmung ist das grüne Licht (bzw. der gehobene Flügel) des Ausfahrsignals.

Dasselbe grüne Licht bestätigt den vorbereiteten und freien Weg, die festgelegte Fahrstraße. Weil diese nun alle anderen blockiert, die ihren Weg berühren oder kreuzen und dies in großen Bahnhöfen den Verkehrsfluss entscheidend behindern kann, wartet der betreffende Fahrdienstleiter meist bis zum letzten Moment.

Ein Projekt im Rahmen des Programms „PlanStart“ der Deutschen Bahn folgt nun der Idee, dem Zugpersonal anzukündigen, dass das grüne Licht bald folgen wird und es zur Aufnahme der Abfahrvorbereitungen zu veranlassen. Diese Ankündigung soll durch ein neues Lichtsignal erfolgen, namentlich durch ein weißes Dreieck auf dem Bahnsteig.

Überlegungen über die Art, dieses Signal zu generieren ohne den Fahrdienstleiter zusätzlich zu belasten, führten zu einer Lösung, die

[1]) DB Konzernkommunikation, Fragen und Antworten zur Pünktlichkeit

nalo, nome blanka triangulo sur la kajo.
Pripensoj pri la maniero generi tiun signalon sen aldone ŝarĝi la trantrafikestro kondukis al solvo realigita ĝis nun nur ĉe la trakoj 6-9 de la ĉefstacio Frankfurt/Main. Tie la elektronika regejo liveras informon 20 sekundojn antaŭ la verda lumo. Aliaj regejaj teknikoj postulas aliajn solvojn.
Ne jam realeco ankaŭ estas la alternativo per la fervoja komunika reto GSM-R sendi la blankan triangulon sur la ekranon de la trajnestra poŝtelefono.

Guido Brandenburg

bisher nur an den Gleisen 6-9 des Hauptbahnhofs Frankfurt/Main realisiert worden ist. Dort liefert das elektronische Stellwerk eine Information 20 Sekunden vor dem grünen Licht. Andere Stellwerkstechniken erfordern andere Lösungen.
Noch keine Wirklichkeit ist auch die Alternative, mit dem bahneigenen Kommunikationsnetz GSM-R dem Zugchef das weiße Dreieck auf die Anzeige des Mobiltelefons zu senden.

(trad. Brandenburg)

Centra kotiza konto de GEFA

Kiel anoncite en la Fervoja Esperantisto 4/2016, la lasta numero de la pasinta jaro, nia asocio realigis kelkajn organizajn ŝanĝojn, al kiuj apartenis la dissolvo de la distriktoj. Samtempe estis nuligataj la kontoj de la iamaj distriktoj norda/orienta kaj suda. La membrokotizoj nun estu pagataj al unu centra konto.
Ni petis per letero ĉiujn koncernatajn membroj, ŝanĝi la celkonton en ripeta ĝirkomisio, respektive indiki la novan celkonton en unuopa ĝirkomisio.
Por la membroj en la iama distrikto okcidenta nenio ŝanĝiĝis, ĉar la distrikta konto nun fariĝis la centra kotiza konto.



Por memoro:
Kotizkonto:
Nomo: BSW Esperanto Essen
IBAN: DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC: GENODED1SPE

Guido Brandenburg

Zentrales Beitragskonto der GEFA

Wie im Fervoja Esperantisto 4/2016 angekündigt, der letzten Nummer des vergangenen Jahres, hat unsere Vereinigung einige organisatorische Veränderungen umgesetzt, zu denen die Auflösung der Bezirke gehörte. Gleichzeitig wurden die Konten der ehemaligen Bezirke Nord/Ost und Süd gekündigt. Die Mitgliedsbeiträge sollen nun auf ein zentrales Konto eingezahlt werden.
Wir haben durch einen Brief alle betroffenen Mitglieder gebeten, das Zielkonto ihres Dauerauftrags zu ändern, bzw. das neue Zielkonto bei Einzelüberweisungen einzutragen.
Für die Mitglieder im ehemaligen Bezirk West hat sich nichts geändert, weil das Bezirkskonto West nun zum zentralen Beitragskonto geworden ist.

Zur Erinnerung:
Beitragskonto:
Name: BSW Esperanto Essen
IBAN: DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC: GENODED1SPE

(trad. Brandenburg)



Plursistema tramo de Albtalbahn survoje tra la Murg-valo / Mehrsystem-Straßenbahn der Albtalbahn auf dem Weg durch das Murgtal (Foto: hpgruesen/Pixabay)

Lanbula ĉapelo kaj ŝinko, kukola horloĝo kaj ĉerizotorto GEFA-Jarkunveno 2017

La Nigra Arbaro, montaro timiga kaj netravidebla por la romianoj, ĉarma kaj afabla por ni hodiaŭ, memorigas nin unue pri lanbula ĉapelo, ŝinko, kukola horloĝo kaj ĉerizotorto.



El vidpunkto de la loĝantoj dum jarcentoj la hejma pejzaĝo havis malpli romantikan aspekton. Ĝi signifis prioritate geografian malfavoron. Peza sorto kaj pena vivo naskis mitojn kaj fabelojn - plej konata la „malvarma koro“, kies malfeliĉa protagonisto Peter, malriĉa kaj malrespektata karbisto, serĉas la Vitrovireton por ke ĝi plenumu al li tri dezirojn.

La reganta malriĉeco devigis multajn enloĝantojn al elmigro. Kiuj restis, tiujn la sorto forĝis kaj formis ilin al homoj kun specifaj karakterizaĵoj. La senfine saĝa interreto citas kontribuon de la reĝa statistike-topografia oficejo el la jaro 1858:

Bollenhut und Schinken, Kuckucksuhr und Kirschtorte GEFA-Jahresversammlung 2017

Der Schwarzwald, ein Gebirge beängstigend und undurchschaubar für die Römer, nett und angenehm für uns heute, erinnert uns zuerst an Bollenhut, Schinken, Kuckucksuhr und Kirschtorte.

Aus dem Blickwinkel der Einwohner hatte die heimische Landschaft einen weniger romantischen Aspekt. Sie bedeutete im wesentlichen einen geografischen Nachteil. Ein schweres Schicksal und ein mühevolles Leben brachte Mythen und Märchen hervor – das bekannteste „Das kalte Herz“, dessen unglücklicher Protagonist Peter, ein armer und verachtete Köhler, das Glasmännchen sucht, damit dieses ihm drei Wünsche erfüllen sollte.

Die herrschende Armut zwang viele Einwohner in die Emigration. Die blieben, die schmiedete das Schicksal und formte sie zu Menschen mit besonderen Eigenschaften. Das unendliche weise Internet zitiert einen Beitrag des Königlich Statistisch-Topographischen Bureaus aus dem Jahr 1858:

“La homspeco ĝenerale ne estas tre forta, pli sub ol super meza grandeco, pli magra ol bone nutrita kaj pli kun pala kaj malsana ol freŝa kaj sana vizaĝkoloro. Tio precipe validas por Baiersbronn, kies enloĝantaro pro troa laborado kaj mankoj ĉiaspecaj estas evidente mizeriĝintaj kaj velkintaj [...]. Malgraŭ tiu kaduka aspekto tiuj uloj, nome la Baiersbronnanoj, estas tre harditaj kontraŭ atmosferaj influoj kaj korpaj streĉoj kaj montras eksterordinaran vivopersistecon kaj rezistemon kontraŭ malsanoj kaj korpaj vundiĝoj”

Por fino de la mizero zorgis (ĉu diri „kompreneble“?) la fervojo. La en la jaro 1901 ĝis Freudenstadt finkonstruita linio “Murgtalbahn” alkroĉis la regionon al la mondo kaj alportis varojn, gastojn kaj bonstaton.

Fervojon kaj turismon kunigas la feria hotelo „Am Kurgarten“, administrata de la fondaĵo Bahn-Sozialwerk kaj proksima al la stacio Baiersbronn. Ĝi gastigos de la 7-a ĝis la 9-a de Oktobro 2017 la GEFA-jarkunvenon. La hotelo (minimume tristela) disponigas komfortajn ĉambrojn, naĝejon kaj aliajn distrajn ofertojn.

La programo de la kunveno antaŭvidas ekskursojn en la historion de la regiono – veturante kaj promenante al la vitrofarejo Buhlbach kaj la Hauff-muzeo kaj komforte sidante dum vespera retrospektivo pri la „Murgtalbahn“-linio.

Okazos konversacia Esperanto-kurso. Pliajn programerojn ni ankoraŭ pripensas.

Atentu: Eksterlandaj gastoj ne pagas partoprenkotizon.

Aliĝo ĝis / Anmeldung bis 30.06.2017

Sendu aliĝilon al/ sendet die Anmeldung an:

Guido Brandenburg
Görlitzer Straße 17
48317 Drensteinfurt *aŭ/oder*
fervoja.esperantisto@t-online.de

Kaj la pagon por kotizo kaj tranokto al / und die Zahlung für Teilnahme und Übernachtung gebühr an

Nomo BSW Esperanto Essen
IBAN: DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC: GENODED1SPE

Guido Brandenburg

(trad. Brandenburg

„Der Menschenschlag ist im Allgemeinen nicht sehr kräftig, eher unter, als über mittlerer Statur, eher dürftig, als gut genährt und mehr von blasser und kränklicher, als frischer und gesunder Gesichtsfarbe. Dieß gilt besonders von Baiersbronn, dessen Bevölkerung durch übermäßige Arbeiten und Entbehrungen aller Art sichtlich herabgekommen und verkümmert ist […]. Ungeachtet dieses schwächlichen Aussehens sind aber diese Leute, namentlich die Baiersbronner, gegen atmosphärische Einflüsse und körperliche Strapazen sehr abgehärtet und zeigen eine ungewöhnliche Lebenszähigkeit und Widerstandsfähigkeit gegen Krankheiten und körperliche Verletzungen.“

Für ein Ende des Elends sorgte (sagen wir „selbstverständlich“?) die Eisenbahn. Die im Jahr 1901 bis Freudenstadt fertiggestellte „Murgtalbahn“-Linie brachte Waren, Gäste und Wohlstand.

Eisenbahn und Tourismus bringt das Ferienhotel „Am Kurgarten“zusammen, verwaltet durch die Stiftung Bahn-Sozialwerk und nahe am Bahnhof Baiersbronn gelegen. Es wird vom 7. bis zum 9. Oktober 2017 die GEFA-Jahresversammlung beherbergen. Das Hotel (mit wenigstens drei Sternen) bietet komfortable Zimmer, ein Schwimmbad und andere Unterhaltungsangebote.

Das Programm der Versammlung sieht Ausflüge in die Geschichte der Region vor – gefahren und zu Fuß zu der Glashütte Buhlbach und dem Hauff-Museum und gemütlich im Sitzen bei der abendlichen Rückschau auf die „Murgtalbahn“-Linie.

Es wird einen Esperanto-Konversationskurs geben. Weitere Programmpunkte überlegen wir noch.

Aliĝilo por la GEFA-jarkunveno en Baiersbronn - 7-a ĝis 9-a de Oktobro 2017
Anmeldeblatt für die GEFA-Jahresversammlung in Baiersbronn - 7. bis 9. Oktober 2017

Aliĝanta persono
Anmeldende Person

Antaŭnomo Vorname	
Familia nomo Familienname	
Strato, numero Straße, Nummer	
Nacieco Nationalität	
Irmalhelpita Gehbehindert	☐

Dua persono en dulita ĉambro
Zweite Person im Zweibettzimmer

Antaŭnomo Vorname	
Familia nomo Familienname	
Strato, numero Straße, Nummer	
Nacieco Nationalität	
Irmalhelpita Gehbehindert	☐

Partoprenkotizo po persono (ne por eksterlandanoj) Teilnahmebeitrag je Person	39,00 €	
Unulita ĉambro (1 lito), inkl. duona pensio Einzelzimmer (1 Bett), incl. Halbpension	111,40 €	
Dulita ĉambro (2 litoj), inkl. duona pensio Doppelzimmer (2 Betten), incl. Halbpension	204,80 €	

Mi ĝiris la dekstre indikitan sumon al la konto
Ich habe die rechts stehende Summe auf das Konto überwiesen
Nomo: BSW Esperanto Essen
IBAN: DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC: GENODED1SPE

Sumo
Summe

Subskribo:
Unterschrift: _____

Rolf Terjung mortinta

La statistiko sobre raportas pri la jaro 2001: „Rolf Terjung BSW-ĉefkomisiito Esperanto“, poste pri la jaro 2004 „Terjung nun ankaŭ GEFA-prezidanto, la membronombro malkreskis al 163“. Kvankam tiel aspektas – ne estis lia kulpo.



Kiam li tri jarojn poste transdonis la oficojn al Achim Meinel, la protokolo menciis simile: „membronombro intertempe 131“, kion Achim same ne povis influi. Ĉiu laboras en sia tempo.

Rolf apartenis al la milita generacio kaj ĝis la fino travivis centojn da bombatakoj en le kelo de la gepatra domo en Mühlheim (Ruhr). Alie ol lia ĝemela frato Günter li kun granda bonŝanco kiel 15-jarulo eskapis la soldatservon. Lia fervoja historio gvidis lin tra multaj stacioj, komencinte kiel juna helpanto, tegmentisto, laboristo en pontokonstruo, poste ranĝisto, fine trajntrafikestro en diversaj lokoj - multaj ŝanĝoj, tamen fideleco al unu entrepreno.

Kial kaj kiel Rolf eltrovis Esperanton, ne estas plu klare eltrovebla. Komence de la 60-aj jaroj li pro scivolemo sekvis inviton al kurso en Duisburg-Wedau, lernis tie kaj tuj klopodis pri la loka grupo. La nomo de Rolf aperas sur la partoprenolistoj de multegaj renkontiĝoj kaj kongresoj. Evidente li ĝuis la vivon inter samideanoj, el kiuj multaj estis personaj geamikoj – kiel Elena, kiun li 2003 edzinigis, kelkajn jarojn post la morto de la unua edzino Luise. Rolf transvivis nur kelkajn monatojn post la forpaso de Elena. Li postlasas memorojn kaj memoraĵojn - memorojn ankaŭ pri la mallaŭta humuro, kun kiu li eltenis la ŝarĝon de la lastaj vivojaroj kaj memoraĵojn, kiujn la filinoj dankinde kolektis kaj konfidis al nia zorgo.

Li ripozu en paco.

Guido Brandenburg

Rolf Terjung verstorben

Die Statistik berichtet nüchtern über das Jahr 2001: „Rolf Terjung BSW-Hauptbeauftragter Esperanto“, später über das Jahr 2004 „Terjung jetzt auch GEFA-Präsident, die Mitgliederzahl sank auf 163“. Auch wenn es so aussieht – es war nicht seine Schuld. Als er drei Jahre später die Ämter Achim Meinel übergab, bemerkte das Protokoll ähnlich: „Mitgliederzahl nunmehr 131“, wofür Achim genauso wenig konnte. Jeder arbeitet zu seiner Zeit.

Rolf gehörte zur Kriegsgeneration und überlebte bis zum Ende hunderte von Bombenangriffen im Keller des Elternhauses in Mühlheim (Ruhr). Anders als sein Zwillingsbruder Günter entkam er mit viel Glück als 15-Jähriger dem Militärdienst. Seine Eisenbahngeschichte führte ihn durch viele Stationen, begonnen als Junghelfer, Dachdecker, Brückenarbeiter, später Rangierer, schließlich Fahrdienstleiter an verschiedenen Orten – viele Wechsel, trotzdem Treue zu einem Unternehmen.

Warum und wie Rolf Esperanto entdeckt hat, ist nicht mehr eindeutig herauszufinden. Anfang der Sechzigerjahre ist er aus Neugier der Einladung zu einem Kurs in Duisburg-Wedau gefolgt, hat dort gelernt und bemühte sich sofort um eine Ortsgruppe. Rolfs Name erscheint auf den Teilnahmelisten sehr vieler Treffen und Kongresse. Offensichtlich genoss er das Leben unter Gleichgesinnten, von denen viele persönliche Freunde waren – wie Elena, die er 2003 heiratete, einige Jahre nach dem Tod seiner ersten Frau Luise. Rolf überlebte nur einige Monate nach dem Abschied von Elena. Er hinterlässt Erinnerungen und Erinnerungsstücke – Erinnerungen an seinen leisen Humor, mit dem er die Last der letzten Lebensjahre ertrug und Erinnerungsstücke, die die Töchter dankenswerterweise gesammelt und unserer Sorge anvertraut haben.

Er ruhe in Frieden.

(trad. Brandenburg)



Sendorme

Kun timo vekiĝis mi el sonĝad';
Aŭdiĝas dumnokte alaŭda kantad'!

Jam iris la tago, forestas maten',
Sendorme mi kuŝas sur mia kusen'.

La kant' de l' alaŭdo, plusonas ĝi;
Ho voĉo de l' tago, angoras mi!

(trad. Manfred Retzlaff)

Schlaflos

Aus Träumen in Ängsten bin ich erwacht;
Was singt doch die Lerche so tief in der Nacht!

Der Tag ist gegangen, der Morgen ist fern,
Aufs Kissen hernieder scheinen die Stern'.

Und immer hör' ich den Lerchengesang;
O Stimme des Tages, mein Herz ist bang.

Theodor Storm

Kun bedaŭro ni anoncas la morton de nia fidela membro:

Heinrich Bauer el Ruderting
en aĝo de 87 jaroj

Mit Bedauern zeigen wir den Tod unseres treuen Mitglieds an:

Heinrich Bauer aus Ruderting
im Alter von 87 Jahren

Redaktofino por FE 02/2017 estos la 15.05.2017		Redaktionschluss für FE 02/2017 ist 15.05.2017	
Eldono:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.	Herausgabe:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio:	Guido Brandenburg	Redaktion:	Guido Brandenburg
Adreso:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt	Adresse:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono:	02508-9107	Telefon:	02508-9107
Fakso:	02508-984511	Fax:	02508-984511
Retpoŝto:	fervoja.esperantisto@t-online.de	Email:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Kotizkonto:		Beitragskonto:	
Nomo	BSW Esperanto Essen	Name	BSW Esperanto Essen
IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63	IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC:	GENODED1SPE	BIC:	GENODED1SPE
Donacoj estas bonvenaj sur konto:		Spenden sind willkommen auf dem Konto:	
Nomo	Karl Bernhard GEFA	Name	Karl Bernhard GEFA
IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29	IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29
BIC:	GENODEF1S12	BIC:	GENODEF1S12